

Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Decembro 2002

73-a jaro, n-ro 12 (1170)

ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

MENSUEL/MONATA

<http://www.sat-esperanto.org/> *** **retadreso: satesper@noos.fr**



*Sukcesan Novan
Jaron 2003 !
deziras al ĉiuj
la Redakcio*



Kunvenis japanaj gekamaradoj.

Unua vico de maldekstre: Hanazawa, Yamasaki, Kurisu, Kawahara

Dua vico de maldekstre: Viola, Oikawa, Tani, Saiki, Ie, Nonomura

En la foto mankas du: Tahira, kiu fotas kaj Nakamura vidu p. 163



www.moniagnes.org

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



*Karaj,
per tiu ĉi numero ni
finas la ĉi-jaran se-
rion de Sennaciulo.*

*Ankoraŭ unu jaro fi-
niĝas kaj baldaŭ ni eniros la novan
jaron 2003, en kiu ni spertos la in-
ternacian Plenum-Komitaton. Ĉu ĝi
bone funkcios ni konstatos tre rapi-
de, sed ni estu optimistaj. Almenaŭ
la deziro pri sukceso ne mankas.
Same ni esperu ke la nova jaro al-
portu al nia progresema asocio pli
da membroj kaj da aktiveco en la
sfero de sociala kaj laborista kam-
po. Evidente, tio principe dependas
de vi, ĉar SAT estas SAT-anoj. La
Plenum-Komitato nur provos plenu-
mi viajn iniciatojn kaj subteni vian
agadon. Do, kuraĝe antaŭen. Akti-
vu kaj la sukcesoj ne mankos!*

*Belajn festojn kaj ĝis la unua
venontjara numero, salutas vin via,*

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 52€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

SPECIALA OFERTO

En la stoko ĉe SAT restis certa kvanto de malnova PIV. La prioritaton por aĉeto havas esperantistoj el malpliriĉaj landoj.

Neta prezo: 40 €

+ reg. afranko

por Francio: 4,27 €


Eŭropo: 6,95 €

aliaj landoj: 9,15 €

Bonvolu mendi ĉe la SAT-sidejo,

67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris.

Pago al la poŝtkonto de SAT: n° 1234-22 K, Paris.



PETO DE KAMARADO

Ĉu iu leganto povas sendi al mi fotokopion de artikolo verkita de Pekin (aŭ Bagin) kiu aperis en la gazeto «Libera Laboristo» (Aŭgusto 1921, n° 2), kaj titolita «Historio de la anarkiista movado en Ĉinio»? Mi antaŭdankas. Jen mia adreso : Ferdi VINCE, «Hejme», 13 rue du Dr. Schweitzer, FR-44600 Saint-Nazaire, Francio. Tel/fakso: 00.33.2.40.70.46.74.



Nova PIV aperis !

Akiru ĝin ĉe SAT.

Prezo: 70 € + afranko

Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €

ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

Sukcesan Redakcion

SAT-ana kunveno en Japanio

En la 31-a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro ni, SAT-anoj en Japanio, havis epokfaran kunvenon en Tokio. Kunvenis 12 gekamaradoj, inkluzive de k-do Kurisu Kei, unu el la plej malnovaj SAT-anoj en Japanio, k-do Yamasaki Seikō, ĝenerala konsilanto de SAT, kaj Tani Hiroyuki, SAT-peranto en Japanio.

Ni kutimas kunsidi enkadre de la Japana Kongreso. Tio havas meriton, ĉar fakkunsido malfermita al ĉiuj kongresanoj funkcias ankaŭ kiel varbejo de novaj membroj. Venas nemembroj-interesatoj, al kiuj ni donas informojn pri SAT, kaj ili poste aliĝas al la asocio. Ofte okazas, ke ili esprimas deziron aliĝi jam dum la kunsido. SAT-fakkunsido en la Japana Kongreso tamen esence estas diskuteto por la membroj. Sed ĝia limigita tempodaŭro, kutime unu kaj duona horoj, estas tro mallonga por ĉio ĉi, des malpli, ĉar lastatempe svarmas fakkunsidoj en la kongreso, kaj ne ĉiuj el ni havas eblon ĉeesti la nian pro multoblaj samtempaj programeroj.

Jam en 1991 k-do Miyazawa Naoto el Sapporo alvokis al ni, ke ni organizu LEA-on en Japanio, kaj en 2000 k-do Yamasaki Seikō denove tion alvokis. Sed dum la jaroj ni ne havis ŝancon por ĝisfunde pridiskuti la aferon en la fakkunsidoj. Ni nur la lastan jaron povis decidi, ke ni kolektiĝu en aparta kunveno ekster la kongreso, kaj ke ni ankaŭ fondu interretan dissendoliston por la SAT-anoj en Japanio, kie oni rajtas uzi krom Esperanto ankaŭ la japanan, tiel ke ankaŭ komencantoj povu esprimi sin en la listo. Se ni ne havas kondiĉon por diskuti, ni devas antaŭ ĉio krei ĝin.

SAT-anoj en Japanio iam havis sian apartan kunvenon nomatan Lanti-festo ĉirkaŭ la jaro 1970. Sed la partoprenantoj de tiama Lanti-festoj estis limigitaj je relative malnovaj membroj, loĝantaj plejmulte en Kansajo, okcidenta regiono de Japanio. En ĉi-foja kunveno partoprenis el plej diversaj regionoj, kaj ankaŭ

estas menciinde, ke duono de la partoprenantoj estis novaj membroj, membriĝintaj nur en la 21-a jarcento. Tio kredeble estas signo de esperplena estonteco.

K-do Kurisu, kiu, nun 92-jara, estas tre vigla kaj ĉiujare kontribuas al Sennacieca Revuo, prelegis Esperante kun la titolo «Sporade ĉirkaŭ SAT». Ĝian enhavon oni espereble povos legi en la venonta numero de Sennacieca Revuo. Li ankaŭ proponis, ke ni sendu nome de ĉiuj partoprenantoj de la kunveno gratulmesaĝojn al k-do Kreŝimir Barkoviĉ, kiu gajnis prestiĝan OSIEK-Premion pro sia esperantigo de «7000 tagoj en Siberio» de Karlo Ŝtajner, kaj ankaŭ

al SAT, kiu sukcese eldonis la novan PIV. Ni unuanime aprobis tion.

Ni diskutis pri fondo de LEA en Japanio. Yamasaki klarigis, kial LEA estos necesa ankaŭ en Japanio en ne-foja estonteco. Tani parolis pri la ne-



Kurisu vigle parolas inter Oikawa kaj Viola

ceso de organizo por krei pli efike na-

Mesaĝo gratula kaj alvoka

Ni, 12 SAT-anoj el diversaj urboj de Japanio, renkontiĝintaj en Tokio en la 31-a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro 2002, konstatas kun grandaj ĝojo kaj kontento, ke nia SAT ĉi-jare travivis du grandajn eventojn, gravajn ne nur por SAT mem sed ankaŭ por la tutmonda Esperantujo, nome la eldoniĝo de la nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kaj la honoriĝo de «7000 tagoj en Siberio» de Karlo Ŝtajner, esperantigita de k-do Kreŝimir Barkoviĉ, nia ĝenerala sekretario, per la prestiĝa OSIEK-Premio.

Ĉe tio ni opinias, ke ni devas pri tiuj du grandaj eventoj kun fiero gratuli k-don Michel Duc Goninaz, la ĝeneralan gvidanton, sed ankaŭ ĉiujn liajn kunlaborintojn, kaj k-don Kreŝimir Barkoviĉ koncerne la duan.

Ni samtempe alvokas al ĉiuj SAT-kamaradoj el la tuta mondo, ke ili, se ankoraŭ ne, laŭeble aĉetu al si almenaŭ unu ekzempleron de la du titoloj, ĉar tio ne nur utilos al ili mem sed ankaŭ grave kontribuos al stabiliĝo de la financa stato de SAT, tiel ke ĝi povu ekentrepreni kaj realigi pliajn projektojn, kiuj estos utilaj ne nur por ni mem sed ankaŭ por la tuta Esperanto-movado.

Hanazawa Masazumi, Ie Harumi, Kawahara Kazuya, Kurisu Kei, Nakamura Daishin, Nonomura Jo, Oikawa Yukiko, Saiki Akira, Tahira Masako, Tani Hiroyuki, Viola, Yamasaki Seikō.